

**DEK KVIN PECOJ EL
LA ĈINA KLASIKA
POEZIO KANTANTAJ
PRI LA LUNO**

咏月古诗词十五首

**Elektitaj kaj esperantigitaj de
Wang Chongfang**

王崇芳选译

**Simpla, kaj ankoraŭ pli simpla, en la lingvo;
Eleganta, kaj kiel eble plej eleganta, en la stilo:
Jen la plej alta celo, al kiu mi strebas en mia traduko.**



La lunleviĝo¹ 月出 (《诗经·陈风》)

Kiel brila estas la leviĝanta luno!
Kiel bela estas mia amatino!
Ŝia svelta figuro kaj gracia paŝado
Ĵetas min en raviĝon kun forta korbatado.

Kiel klara estas la leviĝanta luno!
Kiel ĉarma estas mia amatino!
Ŝia svelta figuro kaj facila paŝado
Ĵetas min en raviĝon kun spirit-agitiĝo.

Kiel hela estas la leviĝanta luno!
Kiel eleganta estas mia amatino!
Ŝia svelta figuro kaj delikata paŝado
Ĵetas min en raviĝon kun dolora sopiro.

¹Tiu ĉi estas la plej frua poemo en la ĉina poezio, kiu priskribis la belecon de la leviĝanta luno kaj la viran enamiĝon al sia amatino.

— el Kantoj de Chen en *LA LIBRO DE POEZIO* (la 6a jc. a.K.)

月出
月出皎兮，佼人僚兮，
舒窈纠兮，劳心悄兮。
月出皓兮，佼人懌兮，
舒忧受兮，劳心慄兮。
月出照兮，佼人燎兮，
舒夭绍兮，劳心惨兮。
《诗经·陈风》

el *Demandoj al la Ĉielo de Qu Yuan*¹ 《天问》片断（屈原）

Kie do la ĉieloj renkontiĝas kun la tero?
Kiel la dek du horoj faras unu tagon?
Kiel do la suno kaj la luno povas pendi alte?
Kaj kiel la steloj tiel viciĝas, ĉiu sur sia loko?

Se la suno leviĝas el la Suna Valo
Kaj subiras al la rivero Meng,
Je kiom da distanco do ĝi kuras
De la mateno ĝis la vespero?

Kian virton havas la luno, ke ĝi,
Por ankoraŭfoje renaskiĝi, povas mem morti?
Kian avantaĝon do povas havi,
Ke ĝi tenas en sia ventro leporon²?

¹Qu Yuan, la plej frua granda poeto de Ĉinio (ĉ. 340 a.K.— 278 a.K.).

²Antikvaj ĉinoj kredis, ke la luno havas en si bufon, aroman osmantan arbon kaj leporon, kiu pistas la drogon de senmorteco per pistilo kaj pistujo.

天何所沓？十二焉分？
日月安属？列星安陈？
出自汤谷，次于蒙汜。
自明及晦，所行几里？
夜光何德，死则又育？
厥利维何，而顾菟在腹？
（屈原：《天问》）

La luno super la rivero en printempa nokto¹ 春江花月夜 (张若虚)

Zhang Ruoxu (ĉ. 647—ĉ. 730)

En printempo la rivero ŝvelas kune kun la maro,
La hela luno leviĝas super la maro samtempe kun la tajdo.
La luno sekvas la vastan ondaron ĝis la perdo de vido,
Kie sur la printempan riveron verŝiĝus nenia lunlumo?

La riveraj meandroj ĉirkaŭiras la aroman insuleton,
La florarbaretoj prilumitaj de la luno briletas kiel grajlaj grajnoj.
Oni ne rimarkas la prujnon flugantan en la aero,
Nek vidas la riverbordan sablon blankan, kiu fandiĝas kun la luna heleco.

La rivero kaj la ĉielo havas la perfekte saman koloron sen eĉ unu polvo,
Kaj en la pura etero pendas soleca luno radosimilanta.
Kiu la unua ekvidis la lunon sur la bordo de la rivero?
Kaj en kiu jaro la luno komencis prilumi la homojn de la mondo?

Generacio venis, generacio pasis, ili sin sekvas senfine,
Sed la luno super la rivero restas la sama de jaro al jaro.
Oni ne scias, por kiu la luno verŝas sian lumon ĉi-nokte,
Sed oni vidas nur, ke adiaŭe forfluas la akvo de la rivero.

Foren, foren moviĝas malrapide unu ŝvebanta blanka nubo,
Ĝin adiaŭante ĉagreniĝas la verdaj aceroj kreskantaj surborde.
Ĉi-nokte, kiu do estas tiu, kiu la sola lasas veladi sian ŝipeton?
Kaj kien flugas la amsopiraj pensoj en la pavilono prilumata de la luno?

Ho ve! la luno kvazaŭ senmove restadas sur la pavilono,
Ĝi devas vidi la tualetan tablon, antaŭ kiu ŝi penseme sidas.
Ŝi tiras malsupren la kurtenon, sed luno ne estas for de ŝi;
Kiam ŝi lavas la tolaĵon, la lumo restas sur la lavŝtono.

Ŝi kaj la luno sin rigardas reciproke sen povi aŭdi unu alies voĉon,
Ho, kiel ŝi volus sekvi la lunon por prilumi sian plejamatatan!
La leter-portanta sovaĝa ansero ne povas flugi trans la lunluman vaston,
Nek la fiŝo, nek la drako, kiu sin kaŝas en la akvo, povas transdoni mesaĝon.

Lastanokte ŝi songis pri la floroj falantaj sur kvietan lageton,
Bedaŭrinde, la duono de la printempo jam pasis sen la reveno de ŝia amato.
La senfine fluanta rivero forportas la restantan belan printempon,

La luno super la rivero kliniĝas oblikve al la okcidento.

La oblikva luno finfine kaŝiĝos meze de la mara nebulo;
Longa estas la vojo inter la montoj norde kaj la akvoj sude.
Kiom da homoj povus reveni rajdante sur la lunlumo? —
Jen la subiranta luno inundas la arbarojn ĉeriverajn per siaj palaj sentimentoj.

¹Tiu ĉi poemo priskribas kvin el la plej belaj aferoj en la naturo: printempo, rivero, floroj, luno kaj nokto, kaj ankaŭ belan virinon inter floroj sub la luno en printempa nokto, pripensantan sian amaton veturantan sur la rivero, sekve la belo de la naturo miksiĝas kun la amo al la karulo.

春江花月夜

张若虚（唐）

春江潮水连海平，海上明月共潮生。
滟滟随波千万里，何处春江无月明！
江流宛转绕芳甸，月照花林皆似霰；
空中流霜不觉飞，汀上白沙看不见。
江天一色无纤尘，皎皎空中孤月轮。
江畔何人初见月？江月何年初照人？
人生代代无穷已，江月年年只相似。
不知江月待何人，但见长江送流水。
白云一片去悠悠，青枫浦上不胜愁。
谁家今夜扁舟子？何处相思明月楼？
可怜楼上月徘徊，应照离人妆镜台。
玉户帘中卷不去，捣衣砧上拂还来。
此时相望不相闻，愿逐月华流照君。
鸿雁长飞光不度，鱼龙潜跃水成文。
昨夜闲潭梦落花，可怜春半不还家。
江水流春去欲尽，江潭落月复西斜。
斜月沉沉藏海雾，碣石潇湘无限路。
不知乘月几人归，落月摇情满江树。

Nostalgiaj pensoj en la hela lumo de la luno 望月怀远（张九龄）

Zhang Jiuling (678—740)

El la maro leviĝas alte la hela luno, ĉi-momente ni,
Kvankam fore apartigitaj, partoprenas en ĝuo de ĝi.
Geamantoj plendas pri la longa nokto, dum mi la mian amas;
Mi dronas en amsopiraj pensoj la tutan nokton, ne dormante.
Mi estingis la kandelon, kaj la ĉambro estas inundita de la luna lumo;
Sentante la rosan humidecon, mi metas sur min plian veston.
Ne povante sendi al vi manplenon da hela lunlumo,
Mi nur iras dormi por feliĉa rekuniĝo kun vi en songo.

望月怀远

张九龄（唐）

海上生明月，天涯共此时。
情人怨遥夜，竟夕起相思。
灭烛怜光满，披衣觉露滋。
不堪盈手赠，还寝梦佳期。

Demandado al la luno, kun vinpokalo en la mano 把酒问月（李白）

Li Bai (701—762)

Kiam do la luno komencis veni al la blua ĉielo?
Mi metas mian vinpokalon flanken kaj demandas.
Ni neniel povas konduki aŭ tiri la lunon,
Tamen ĝi ĉiam moviĝas nin akompanante.
Ĝi brilas kiel fluganta spegulo super la imperiestra palaco,
Kaj eligas eĉ pli puran lumon post disiĝo de lazura nebulo.
Ni vidas ĝian leviĝon el la maro ĉiuvespere;
Kiu do scias, kiel ĝi malaperas en la nubojn ĉe la tagiĝo?
Por kiu do la blanka kuniklo senĉese pistas la viv-eliksiron?
Kaj kun kiu najbare vivas la soleca feino Chang'e¹?
La hodiaŭaj homoj ne vidis la antikvan lunon,
Sed la hodiaŭa luno siatempe prilumis la antikvulojn.
Homoj antikvaj kaj homoj nuntempaj estas kiel akvo fluanta,
Kiuĵ ĉiuj vidas la brilan lunon same tia, kia ĝi ĉiam estas.
Mia sola deziro estas nur, ke kiam ni kantas antaŭ nia vino,
La luno por ĉiam verŝu sian puran lumon en nian pokalon.

¹La blanka kuniklo, Chang'e: Ambaŭ estas mitaj loĝantoj en la luno. Oni imagas, ke en la luno vivas leporo, kiu ĉiam pistas eliksiron de vivo per pistilo kaj pistujo. Chang'e estas legenda virino, kiu, trinkinte eliksiron de longa vivo, ŝtelitan de sia edzo, flugis al la luno, kie ŝi fariĝis senmorta sed estis enfermita tie por ĉiam.

把酒问月

李白（唐）

青天有月来几时，我今停杯一问之。
人攀明月不可得，月行却与人相随。
皎如飞镜临丹阙，绿烟灭尽清辉发。
但见宵从海上来，宁知晓向云间没。
白兔捣药秋复春，嫦娥孤栖与谁邻。
今人不见古时月，今月曾经照古人。
古人今人若流水，共看明月皆如此。
唯愿当歌对酒时，月光长照金樽里。

Nokta penso¹ 静夜思（李白）

Li Bai

Tiel hela estas la lumo antaŭ mia lito; —
Miro min kaptas: ĉu prujno jam falis teren?
Levinte la kapon, mi rigardas la lunon;
Kun la kapo klinita, mi mute nostalgias.

¹En tiu ĉi poemo la poeto esprimas sian fortan sopiron kaj profundajn sentojn por sia naskiĝloko kaj sia familio. Leginte ĝin, ĉiu leganto povas trovi, ke en ĉi kvar mallongaj versoj, kvankam la vortoj estas tre simplaj kaj senornamaj, tamen iliaj signifoj estas senfinaj.

静夜思

李白（唐）

床前明月光，疑是地上霜。

举头望明月，低头思故乡。

Drinkante sola sub la luno¹ 月下独酌（李白）

Li Bai

Inter floroj, kun kruĉo da vino,
Mi sola drinkas sen kunulo.
Levante mian pokalon mi invitas la brilan lunon,
Kaj kune kun mia ombro jen ni formas triopon.
Sed la luno ne scias trinki,
Kaj mia ombro nur vane min sekvas,
Tamen mi tenas kun ili kompanion portempe,
Por ĝui, kaptante la printempon, la vivplezurojn.
Mi kantas, kaj la luno promenas min aŭskultante;
Mi dancas, kaj mia ombro vigle sin swingas kun mi.
Sobraj, ni nin kune plezurigas,
Ebriaj, ni nin disigas.
Lasu do al ni daŭrigi por ĉiam nian senzorgan ligon,
Ke ni iam povu rerenkontiĝi fore sur la Lakta Vojo.

¹La soleca poeto pensas, ke estas plezure drinki kune kun la luno kaj sia propra ombro. Lia soleco rivelas lian malkontentecon pri sia aktuala vivo.

月下独酌
李白（唐）
花间一壶酒，独酌无相亲。
举杯邀明月，对影成三人。
月既不解饮，影徒随我身。
暂伴月将影，行乐须及春。
我歌月徘徊，我舞影零乱。
醒时相交欢，醉后各分散。
永结无情游，相期邈云汉。

Antikva melodio pri brila luno¹ 古朗月行（李白）

Li Bai

En mia infanaĝo, ne konante la brilan lunon,
Mi naive nomis ĝin jada disko pure blanka,
Kaj ankaŭ suspektis, ke ĝi estas feina spegulo
Fluginta inter la blujn nubojn kaj pendanta tie.

Tie unue venas en mian vidon la senmortulaj piedoj,
Kaj poste aperas osmanta² arbo prospere kreskanta.
La blanka kuniklo³ diligente pistas la viv-eliksiron,
Sed kiu ulo do devus ĝin trinki por sin junigi eterne?

La trikrura bufo⁴ mordetas la rondan klaran lunon,
Tiel ke ĝi fariĝis difektita kaj reduktis sian helecon.
La antikva heroo Yi paf-faligis la naŭ el la dek sunoj⁵,
Tiel ke en la ĉielo kaj sur la tero regas sereno kaj paco.

Ĉar la luno jam perdis sian originan helan brilon,
Ĝi ne plu indas, ke oni ĝin rigardu kun admiro.
Pro tio mi estas ŝarĝita de granda tristo kaj ĉagreno,
Kaj ili ĉiam ronĝas mian koron kun akra doloro!

¹En tiu ĉi poemo la poeto esprimis infanajn naivajn kaj strangajn pensojn kaj bonajn intencojn pere de riĉa imago, mita legendo kaj arta koncepto plena de profundaj sugestoj. Cetere, la aŭtoro elverŝis sian internan indignon kontraŭ la koruptiĝo kaj konfuzo kaŭzita de influaj altrangaj ŝtatoficistoj, eŭnukoj kaj generaloj sur la landlimoj pro tio, ke la imperiestro Xuanzong fordonis sin al la plezurĝuado kun sia belega kromedzino Yang Yuhuan. La luno en la poemo simbolas la dinastion Tang; la bufo simbolas la influajn ŝtatoficistojn, eŭnukojn kaj la generalojn en la landlimaj regionoj.

²Osmanto: speco de aroma planto (*Osmanthus fragrans Lour*).

³La blanka kuniklo: oni imagas, ke en la luno vivas kuniklo, kiu ĉiam pistas eliksiron de longa vivo per pistilo kaj pistujo.

⁴La trikrura bufo: laŭ legendo la luna eklipso aperas pro tio, ke la bufo mordetas la lunon.

⁵La legendo diris, ke iam ekzistis dek sunoj en la ĉielo, kiuj sekegis la teron, kaj la granda arkpafisto Yi estis ordonita paf-faligi naŭ el ili. Oni kredis, ke sin trovas Ora Korvo en la suno, same kiel sin trovas jada leporo en la luno: jen kial la suno estas nomata ankaŭ Ora Korvo, kaj la luno, la Jada Leporo.

古朗月行

李白（唐）

小时不识月，呼作白玉盘。
又疑瑶台镜，飞在青云端。
仙人垂两足，桂树何团团。
白兔捣药成，问言与谁餐。
蟾蜍蚀圆影，大明夜已残。
羿昔落九乌，天人清且安。
阴精此沦惑，去去不足观。
忧来其如何，凄怆摧心肝。

Lunluma nokto 月夜（杜甫）

Du Fu (712—770)

Ĉi-nokte la luno super Fuzhou¹ certe klaras;
En nia ĉambro mia edzino nur sola ĝin rigardas.
De fore, mi kompatas miajn junajn infanojn,
Kiu ne scias pensi pri Chang'an², kie mi estas.
En la parfumita nebulo ŝia nubosimila hararo malseketiĝas,
En la klara lunlumo ŝiaj jade blankaj brakoj malvarmiĝas.
Kiam do ni povus flank-ĉe-flanke stari antaŭ la gaze kurtenita fenestro,
Por lasi al la lunlumo sekigi la larmojn sur la vangoj viaj kaj miaj?

¹Fuzhou: malnova nomo de la nuna urbo Fu en la provinco Shaanxi.

²Chang'an: la ĉefurbo dum la dinastio Tang, la nuna urbo Xi'an. Du Fu tiam estis devigita resti en Chang'an dum la Ribelo de An-Shi, for de sia familio en Fuzhou.

月夜

杜甫（唐）

今夜鄜州月，闺中只独看。
遥怜小儿女，未解忆长安。
香雾云鬟湿，清辉玉臂寒。
何时倚虚幌，双照泪痕干。

Skribita sur la muro de la izolita loĝejo de Li Ning 题李凝幽居（贾岛）

Jia Dao (779—843)

Vivante en izoliteco, vi apenaŭ havas najbarojn;
La pado inter herboj kondukas al forlasita ĝardeno.
La birdoj sidas sur la arboj apud lageto;
Sub pala luno la bonzo frapas je la pordo.¹
Trans la ponto la sovaĝeja koloro eniĝas en mian vidon;
La rokoj ŝajnas moviĝi en la ombroj de flosantaj nuboj.
Mi nun foriras portempe, kaj baldaŭ mi revenos,
Por dividi kun vi la kvietecon: jen la promeso nepre tenota.

¹Jen la legendo: iam Jia Dao, poeto de Tang-dinastio, verkis rajdante sur azeno poemon kun ĉi du versoj; li hezitis, ĉu li devos anstataŭigi la verbon “frapi je” per “puŝi” aŭ ne, li plurfoje faris la movojn jen de frapo, jen de puŝo, per sia mano; hazarde li renkontiĝis kun Han Yu, alia poeto, kaj diris al tiu sian embarason; post ioma pripensado tiu kategorie esprimis sian opinion, ke estus pli bone uzi “frapi je”; kaj poste el tiu ĉi legendo devenas la ĉina esprimo 推敲 kun la signifo “elekti [pesi] (siajn vortojn)”.

题李凝幽居

贾岛（唐）

闲居少邻并，草径入荒园。
鸟宿池边树，僧敲月下门。
过桥分野色，移石动云根。
暂去还来此，幽期不负言。

Kanto pri mia filineto 幼女词（施肩吾）

Shi Jianwu (780—861)

Mia filineto estas apenaŭ ses-jara;
Ŝi ne povas distingi lertecon de mallerteco.
Vespere transpaŝinte la sojlon,
Ŝi preĝas, ke la luno estu ĉiam brila.

幼女词

施肩吾（唐）

幼女才六岁，未知巧与拙。
向夜在堂前，学人拜新月。

Melodio: Yumeiren¹ 虞美人·春花秋月何时了 (李煜)

Li Yu (937—978)

Kiam la printempaj floroj kaj la aŭtuna luno
Ĉesos hanti mian memoron tiel ofte?
Ho, tro multaj estas por mi la amaraj pasintaĵoj!
En mian solecan ĉambron lastanokte
Denove blovis la orienta vento.
Kiel mi povus elteni en la luna lumo²
La sopiradon al mia lando perdita?

La skulptitaj balustradoj kaj la marmora perono
Devas esti ankoraŭ tie en la palaco,
Sed ho, la rozaj vizaĝoj jam palas kaj velkas!
Se vi demandus, kiom da malĝojo mi havas en la koro,
Vidu nur la printempan riveron, kiu senfine fluas orienten!³

¹La fruĵaraj *ci*-oj de Li Yu, kiuj priskribis ĉefe la dekadencan kaj luksan kortegan vivon, havas malgrandan valoron. Li Yu ne sciis, kio estas la suferoj kaj kio estas la malĝojo, antaŭ ol li fariĝis kaptita reĝo; sed post la falo de sia regno, li verŝis siajn malĝojojn el la brusto en siajn verkojn, kiuj estas plenaj de sincereco de sentoj, vivaj imagaĵoj en simpla kaj klara lingvo, kaj sekve havas grandan emociforton. Tiu ĉi *ci*-o estas supozita esti lia lasta liriko, kiu estis skribita antaŭ lia morto. La literatura majstro Wang Guowei (王国维) tre alte laŭdis ĝin, dirante, ke “ĝi estis verkita per lia sango”. La fama franca verkisto Alfred de Musset iam diris, ke “la plej bela poeziaĵo estas la plej despera, kaj iuj ĉefverkoj estas puraj larmoj kun despero,” tia ja estas tiu ĉi *ci*-o. Jen kial tiu ĉi cigna kanto estas tiel vaste amata kaj plejofte recitata.

²En la ĉinaj poeziaĵoj, lunlumo estas asociita kun la imagaĵo de hejmveo.

³Vidu nur la printempan riveron, kiu senfine fluas orienten: Ĝi estas fama komparo esprimanta malĝojon pere de akvo. Malĝojo estas senforma, nevidebla kaj nepalpebla, tamen estas vive kaj trafe esprimata per tiu ĉi parolfiguro.

虞美人·春花秋月何时了

李煜（五代）

春花秋月何时了，往事知多少？小楼昨夜又东风，故国不堪回首月明中！
雕栏玉砌应犹在，只是朱颜改。问君能有几多愁？恰似一江春水向东流。

Sur boato ŝnurligita ĉe Guazhou¹ 泊船瓜洲 (王安石)

Wang Anshi (1021—1086)

Inter Jingkou kaj Guazhou fluas nur akvo rivera,
Kaj la monto Zhong estas apartigita disde ili nur je kelkaj montetoj.²
Denove la printempa vento reverdigas la sudan bordon de la rivero,
Sed kiam do la brila luno prilumos mian vojon hejmen revenan?

¹Revenante de la monto Zhong (la monto Zijin en la nuna urbo Nanjing) al la ĉefurbo por repreni la postenon de kanceliero laŭ la imperiestra edikto, la aŭtoro skribis tiun ĉi poemon, en kiu li, perfekte kunfandante siajn sentojn kun la ĉirkaŭaĵo, ne nur priskribis la pejzaĝon plenan de viveco sude de Jangzio kaj implicite esprimis sian internan ĝojon pro tio, ke li povos denove efektiviĝi sian altan idealon pri la politika reformo en la imperiestraj favoroj, sed ankaŭ rivelis sian ioman maltrankvilon pri la komplikaj politikaj bataloj.

²Jingkou, la nuna urbo Zhenjiang en la provinco Jiangsu; Guazhou, loko sude de Yangzhou, kie la Granda Kanalo enfluas en la riveron Jangzio; la monto Zhong estas en la nuna urbo Nanjing.

泊船瓜洲

王安石 (宋)

京口瓜洲一水间，钟山只隔数重山。
春风又绿江南岸，明月何时照我还？

Melodio: Shuidiaogetou 水调歌头•明月几时有 (苏轼)

Sopiro al mia frato en la nokto de la Aŭtunmeza Festo¹

Su Shi (1036—1101)

En la Aŭtunmeza Festo² de la jaro Bingchen (la jaro 1076) mi sate drinkis kun amikoj dum la tuta nokto kaj verkis tiun ĉi poemon en ebrieco, por honori la gajan okazon kaj ankaŭ por esprimi mian fratan amon al Ziyou³.

“En kiu tempo ni ree havos la brilan plenlunon?”
Levante la vinpokalon mi demandas la bluan ĉielon,
“Kaj diru al mi, en via palaco supre,
Kiu jaro estas ĉi-nokte laŭ via jarkalkulo.”
Mi volus rajdi sur la vento kaj supreniri al vi,
Sed mi timas, ke estus tro malvarme en via alto,
Kie la palacoj estas luksaj kun marmoraj muroj.
Mi leviĝas kaj ekdancas kune kun mia propra ombro:
Ho, kiel bele estas ĉi tie, en la homa mondo!

La luno turniĝas ĉirkaŭ la ruĝaj pavilonoj,
Verŝante sian lumon suben tra la fenestrajn latisojn
Kaj prilumante min sendorman.
Ni ja ne devus nutri plendan senton,
Sed kial la luno estas tiel aparte ronda kaj brila, dum ni estas disigitaj?
Kiel la homoj havas siajn ĝojojn kaj tristojn, disiĝojn kaj rekuniĝojn,
Tiel la luno siajn heliĝojn kaj malheliĝojn, kreskojn kaj malkreskojn:
Nenio estas perfekta en ĉi mondo ekde la pratempo.
Mi deziras nur, ke ni ambaŭ ĝuu longan vivon. —
Tiam, kiel ajn fore ni estos apartigitaj unu de la alia,
Ni povos ankoraŭ dividi la saman lunlumon kiel ĉi-momente.

¹*Melodio: Shuidiaogetou (Preludo al la kanto pri la ondetoj) estas nomo de ĉina ci-poeziformo. La aŭtoro verkis tiun ĉi ci-on en la aŭtunmeza nokto de la lunkalendaro jaro, ĉar en tiu ĉi nokto ĉiaj sentoj alfluis en lian menson, kaj li pretervole eksopiris al sia pli juna frato en la malproksimo.*

²Aŭtunmeza Festo (la 15-a de la oka monato laŭ la luna kalendaro), alinome Festo de la Plena Luno aŭ Festo de Familia Rekuniĝo, en kies nokto la plenluno ŝajnas aparte hela kaj bela al la ĝoje kuniĝantaj familianoj aŭ amikoj, kiuj ĝin kune admiras.

³Ziyou: nomo de lia frato.

水调歌头·明月几时有

苏轼（宋）

丙辰中秋，欢饮达旦，大醉，作此篇，兼怀子由。

明月几时有？把酒问青天。不知天上宫阙，今夕是何年。我欲乘风归去，又恐琼楼玉宇，高处不胜寒。起舞弄清影，何似在人间？

转朱阁，低绮户，照无眠。不应有恨，何事长向别时圆？人有悲欢离合，月有阴晴圆缺，此事古难全。但愿人长久，千里共婵娟。

Melodio: Linjiangxian 临江仙·滚滚长江东逝水（杨慎）

Yang Shen (1488—1559)

La ruliĝanta Jangzio senfine fluas al la oriento:
Ĝiaj ondoj jam forportis ĉiujn heroojn de la pasinteco.
Sukceso aŭ malsukceso, pravo aŭ malpravo —
Ili ŝajnas ne pli gravaj, ol la ekturto de via kapo.
Sed la verdaj montoj restas tie ankoraŭ,
Kaj kiomfoje do la subiranta suno havas la gloran postbrilon?

La blankharaj fiŝistoj kaj arbohakistoj sur la insuletoj jam
Kutimas vidi la ŝanĝiĝojn de la printempa vento kaj aŭtuna luno.
Ni do trinku ĉiu kruĉon da kruda vino pro nia feliĉa renkonto;
Tiom multe da momentaj eventoj, pasintaj kaj nunaj,
Estas jam neniĝintaj kun niaj ridoj kaj babiloj!

临江仙·滚滚长江东逝水

杨慎（明）

滚滚长江东逝水，浪花淘尽英雄。是非成败转头空。青山依旧在，几度夕阳红。
白发渔樵江渚上，惯看秋月春风。一壶浊酒喜相逢。古今多少事，都付笑谈中。